

Johann Wolfgang von Goethe,  
Из Гёте

*tradukita de Михаил Лермонтов*

Горные вершины  
Спят во тьме ночной;  
Тихие долины -  
Полны свежей мглой;  
Не пылит дорога,  
Не дрожат листья ...  
Подожди немного,  
Отдохнешь и ты.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en la Rusan de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 - †1841-07-27).*

*Arg-356-1908 (2013-12-12 22:16:00)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en <http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm>. Vidu ankaŭ la retejon <http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986>. Pri la poeto Lermontov vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил\\_Лермонтов](http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил_Лермонтов). La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinopingloj  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).*

*Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Super montoj regas kviet'

*tradukita de Poul Thorsen*

Super montoj  
regas kviet',  
tra l' foliaro  
nur ventet'  
spiras kun trem'.  
Birdoj arbare silentas,  
se vi atendas,  
pacas vi mem.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (\*1915-01-07 - †2006-01-30).*

*Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)*

*Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/kaj> <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.*